



Novjorka Prismo

Numero 103

Aprilo 2001

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia aprila kunveno

DATO: Vendredon, la 20-an de aprilo 2001, 6:30-9:00 pm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – La Tenesia Trupo prezentos la teatraĵon:

Vitra tramo sur varmega lada tegmento
(kun pardonpetoj al s-ro Williams). ★

Protokolo de la kunveno de la 16-a de marto 2001

Rochelle F. GROSSMAN malfermis la kunvenon je la sepa horo pm. Ĉeestis dek kvar personoj. Ĉar mankis kaj la prezidanto kaj la vicprezidanto, Rochelle, nia korespondanta sekretariino, prezidis la kunvenon. Ĉar multaj el la ĉeestantoj ne ricevis sian ekzempleron de *Novjorka Prismo* antaŭ la kunveno, Rochelle havebligis kopiojn al la ĉeestantoj. Pam LIEBER ricevis sian ekzempleron en la poŝto antaŭ la kunveno, kaj ŝi menciis protokolon eraron: la fakton, ke la desegnaĵoj de ŝia amikino ne estas mendeblaj, sed troveblaj, je la Interreto. Tuj poste, la protokolo estis akceptata. Pam ankaŭ menciis, ke ŝi ricevis leteron de ĉino, kiu loĝas en Novjorko kaj interesiĝas pri nia klubo. Rochelle ricevis poŝtkarton de nia prezidanto, Tom ECCARDT, el Italio. Ŝi ankaŭ ricevis fakson de Husejn AL-AMILY el Londono.

Je la 7:30, Arnold VICTOR komencis sian prelegon, kiu traktis la diversajn metodojn por montri la ĉapelitajn literojn de Esperanto, emfazante la feliĉan nunan situacion: la eblecon uzi Unikodon per komputilo. Antaŭ kaj post la prelego, Arnold ludis Esperantan himnon per sia portebla komputilo. Post la prelego, Arnold instruis kelkajn ĉeestantojn kiel tajpi Esperantajn literojn per komputilo.

Je la 8:30 Rochelle oficiale fermis la kunvenon. Poste, kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

Protokolis: Stuart GREEN

Vitra tramo sur varmega lada tegmento

Se mi dirus al vi, ke 'vitra' signifas *glass*, 'tramo' signifas *streetcar*, 'lada' signifas *tin*, kaj 'tegmento' signifas *roof*, ĉu la titolo de tiu ĉi artikolo memorigus vin pri teatraĵoj de Tennessee Williams? Se vi havas plezurigajn aŭ malplezurigajn memorojn de tiuj teatraĵoj aŭ filmoj, eble vi ĝuos la parodion kun la sama titolo, kiun ni prezentos dum la aprila klubkunveno. Rochelle F. Grossman, Pamela Lieber, Stuart Green, kaj mi klopodos plenumi la rolojn, kiujn Katherine Hepburn, Vivian Leigh, Burl Ives, kaj Paul Newman, iufoje realigis tiel sukcese. Mi devas konfesi, ke dum la verkado de la teatraĵo, mi devis serĉi kelkajn vortojn en vortaro. Do estas nur juste, ke mi provizu por vi liston (vidu dekstren) de la plej malfacilaj vortoj, antaŭ ol vi vidos la teatraĵon. Flanke, ĉu vi povas diveni la anglan ortografion de tiuj ĉi personaj nomoj el la sud-usona dialekto: *Lilaŭmama*, *Beleĝou*, *Deede*? Se ne, prononcu ilin laŭte. Se ankoraŭ ne, venu al la kunveno, kaj ni klarigos. ★

– Tom ECCARDT

scenaro	scenery
ŝminko	makeup
prokrasti	to delay
karuleto	"honey"
gejo	gay person
efekta	showy, loud
epopejo	epic poem
stelo	mona unuo de Esperantujo
bankroto	to go bankrupt
rubujo	trash can
kranio	tap, faucet
enboteligita	bottled
volupta	voluptuous, sexy
manko	shortcoming
serpentumi	to snake, meander
repuŝita ineco	repressed femininity
platona amikeco	Platonic friendship
fantazia	imaginary
alfronti	to face (up to)
necerteco	(dramatic) suspense
travidebla	transparent
racia	rational
artefarita	artificial
ensemado	insemination

Unu monato en Eŭropo kaj Esperantujo de Thomas Eccardt

Mi pasigis preskaŭ la tutan monaton marto vojaĝante en Eŭropo. Mi vizitis sep landojn kaj devis uzi sep malsamajn valutojn. Se ĝi jam ekzistis en papera formo, la Eŭro ŝparus al mi kvar valutojn. Sed mi profitis de \$99 biletoj al/de Londono kaj profitis de aliaj ekster-sezonaj prezoj. Ĉar mi restis kun amikoj, novaj kaj malnovaj, mi

ŝparis hotel-kostojn kaj sentiĝis kiel hejme. En Londono, mi restis kun Antony Rawlinson kaj lia korea edzino Bela Lumo kaj lia bebinio Bianca. Mi ĉeestis kunvenon de la Londona e-klubo, kie mi ekkonis malnovan esperantiston, Peter Danning, kiu iufoje vizitis mian hejmurbon en Longa Insulo. Li
(daŭras sur paĝo 2)

ELNA ĉe Unifem

La 7-an de marto mi reprezentis ELNAn ĉe eleganta tagmanĝo de la metropola novjorka filio de la usona komitato de Unifem (UN Development Fund for Women) ĉe la delegit-salono de UN. La ĉefpreleganto estis la princino Basma Bint Talal, la fratino de la reĝo Hussein de Jordano kaj bonvol-ambasadoro por Unifem. La princino klarigis pri siaj projektoj por helpi Jordanion progresi.

Oni montris interesan filmon pri postenulo de L'Occitane (la franca kosmetika firmao), kiu malkovris dum vizito al Burkina Faso, ke la virinoj de malgranda vilaĝo havas tiel belan haŭton ĉar ili uzas la buteron de la frukto de la arbo shea (france: *beurre de karité*). L'Occitane faris komercan aranĝon por aĉeti la buteron de la vilaĝo kaj nun uzas ĝin en multaj kosmetikaj produktoj. La virinoj de la vilaĝo en Burkina Faso multe progresas pro la nova aranĝo kun granda konata firmao.

La 22-an de marto mi ĉeestis kunvenon de la usona komitato de Unifem ĉe 777 UN Plaza. La gastpreleganto estis Roxanna Carrillo, homrajta konsilanto ĉe Unifem kaj direktoro de la Trust Fund to Eliminate Violence Against Women. Ŝi rakontis pri diversaj projektoj de diversaj grupoj en diversaj regionoj de la mondo. Dum la posta diskuto, la partoprenantoj sugestis kiel allogi pli da mono al ĉi tiu fonduso. ★

- Rochelle F. GROSSMAN

Bezonata:

**Apartamento por lui
aŭ interŝanĝi dum junio**

Ĉu vi scias pri apartamento aŭ ĉambro en nia regiono luebla dum la monato junio?

La familio de nia samideano kaj klubano Janos SIPOS [ŝipos] venos el Hungario por viziti lin en Novjorko, proksimume de la 10-a de junio ĝis la 4-a de julio. Venas la edzino kaj tri infanoj (15, 8, kaj 1.5 jaraĝaj). Janos preferus resti kun ili, tamen tio ne nepre necesas. Do temas pri 4-5 personoj. Janos bezonas aŭ unu grandan aŭ du malgrandajn ĉambrojn, por kiuj li kompreneble pagos.

Alia ebleco. Se iu interesiĝas, Janos estas preta interŝanĝi la apartamenton de la familio en Hungario kontraŭ apartamento en Novjorko dum tiu periodo. La apartamento troviĝas en la urbeto Szombathely, apud la aŭstria landlimo en la okcidenta hungara kantono Vas (proksimume 230 km de Budapeŝto, 140 km de Vieno). Informo (angla) el la Interreto pri la urbeto troviĝas ĉe:

<http://www.bartleby.com/65/sz/Szombath.html>.

Se vi povas helpi Janos aŭ se vi havas informon, kiu povas helpi lin, bonvolu kontakti lin rekte ĉe:

Janos SIPOS
aviespero@hotmail.com
(917) 975-7992

Dankon! ★

- Jim MEDRANO

Societa kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Aprilo

20

ESNY Kunveno

La Tenesia Trupo prezentas
"Vitra tramo sur varmega lada tegmento"
Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

Free Beginners' Esperanto Class
continues at Stuyvesant Adult Center
Mondays, 7:00-8:30 pm, thru 4/30

Majo

6

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 pm ĉe SONY Plaza
(Limdato por kontribuadoj por Prismo 104)

ESNY Kunveno

18

Friday, 6:30 pm at UFT

United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

SONY Plaza Atrium
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

Stuyvesant Adult Education Center
345 East 15th Street (1st/2nd Avenues) NYC
Fourth floor, room 411

Unu monato en Eŭropo kaj Esperantujo

(daŭras de paĝo 1)

prelegis pri sia vivo kaj spertoj en Esperantujo.

De Londono mi flugis al Alghero, Sardinio. Tiu bela urbo estas la lasta regiono en Italio, kie oni parolas la katalunan lingvon. Kvankam malmulte da homoj ankoraŭ parolas katalune en Sardinio, mi trovis unu, Paolo Delrio, ĉarpentisto kaj metiisto. Ĉar mi parolis katalune, li montris al mi sian laborejon, dum mi filmis lin, kaj li eĉ donis al mi man-faritan memoraĵon! De Alghero mi iris al Nuoro kaj Dorgali, kie oni parolas la veran sardan lingvon. La sarda vere estas mem-stara latinida lingvo, kaj konservas interesajn aspektojn de sia prapatrino. Kvankam mi ne parolis ĝin, mi petis homojn diri kelkajn vortojn dum mi filmis. Kiam ajn mi montris intereson pri minoritata lingvo dum mia vojaĝo, mi ĉiam ricevis bonvenigan reagon, kaj ofte ricevis bonkoran helpon.

En Dorgali, iu virino tradukis tutan sardan rakonton por mi al la itala, kaj laŭtlegis ĝin. Ŝi estas arkeologino, kaj ŝi ankaŭ montris al mi nuraghi, famaj sardaj ŝtonaj konstruaĵoj farataj antaŭ la invado de la romanoj.

Post viziti la havenan urbon Santa Teresa, mi marveturis ĝis Bonifacio, en la insulo Korsiko. Bonifacio eble estas la plej bela loko, kiun mi vizitis dum mia vojaĝo. Ĝi situas en duoninsulo sur altaj kretaj klifoj. Kiel Alghero, ĝi estas malnova fortikaĵo. Post Bonifacio, mi iris al Bastia, la dua plej granda urbo de Korsiko. Ĉie en Korsiko estas memorigiloj pri Napoleono, la plej fama korsikano, kaj en la ĉefa placo de Bastia staras gran-

da statuo de li. Spite la forta ligo inter Napoleono kaj Francio, multaj korsikanoj volas sendependiĝi de Francio, kaj mi parolis kun kelkaj en Bastia. Eble vi scias, ke en Korsiko, oni parolas dialekton de la itala similan al tiu de Genovo. Antaŭnelonge, Korsiko ricevis iom da aŭtonomio de Francio, post jaroj de politika lukto sufiĉe violenta.

Post Korsiko, mi revenis al Italio, kaj vojaĝis al la urbo Rimini. Ĉu vi povas diveni kial Rimini? Mi klarigos en daŭrigo de tiu ĉi 'taglibro' pri mia ferio. Espereble mi havos fotojn tiam. Ankoraŭ mi ne scias ĉu miaj fotoj forbrulis en fajro, kiu preskaŭ tute detruis mian lokan vendejon! ★

- Tom ECCARDT



Bonifacio. Fotis: M.F. DESJOBERT
<www.sitac.fr/users/scotto/bonifacio.htm>

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Stuart Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Leong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(718) 671-5699

Program-Direktoro
Susan Kohn
(212) 226-0443

Novjorka Prismo

Numero 103 - Aprilo 2001
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com

© 2001 Esperanto Society of New York